

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro/Marto 1984



ESPERANTO ★ 36-a KONGRESO DE IFEF – 1984, BULGARIO



Venu, vidu, ĝuu!



Bulgario – lando de la 36a IFEF-Kongreso

Post multaj jaroj la bulgaraj gekolegoj invitas la Internacian Fervojistan Esperanto-Federacion okazigi la venontan kongreson en Slânĉev Brjag (Suna Bordo) inter la 12a kaj 18a de Majo 1984.

Volonte la partoprenintoj al la 20a IFEF-Kongreso rememoras pri la agrablaj tagoj, kiujn ili pasigis en 1968 en komfortaj hoteloj ĉe la Ora Strando apud la havenurbo Varna. Sed kiel jam siatempe necesas ankaŭ por la venonta kongreso bone prepari la vojaĝon, ĉar la distanco inter nia lando kaj Bulgario estas sufiĉe granda. Pro tio aperis en la BULTENO n-ro 5/1983 ampleksaj informoj pri vojaĝo kaj restado. Ĉiuj kongresanoj estas petataj bone atenti ilin antaŭ la aliĝo. Supozeble multaj germanoj eluzos la proponitan vojaĝon per aviadilo.

Ĉu vi interesiĝas pri la kongreslando? La historio de Bulgario komenciĝis en la jaro 679, kiam la prabulgaroj fondis la unuan bulgaran regnon. En la naŭa jarcento la caro Boris akceptis la ortodoksan kristan religion, kiu enkondukis la makedonian dialekton kiel oficialan de la memstara bulgara eklezio. En la jaro 1055 estas starigita la dua bulgara regno kun la metropolo Tirnovo, nuntempe unu el la plej ravaj kaj multe vizitataj urboj. Fine de la 14a jarcento konkeris la landon la turkoj. Ilia okupado daŭris kvin jarcentojn ĝis komence de la 20a jarcento. Tamen la bulgaroj sukcesis savi sian propran kulturon. Famaj estas la bizilikoj en bizanca stilo, la ikonoj kaj ornamaĵoj. La literaturo estas akcentita per fortaj naciaj sentoj. Depost la 10a jarcento la cirila skribo estas la kutima. Tamen ankaŭ la influo de la turkoj dum jarcentoj ofte estas konstatebla, ekz. en restintaj moskeoj aŭ en la muziko aŭ folkloraj dancoj.

En la jaro 1908 Bulgario fariĝis suverena reĝa regno, sed la lando multe suferis dum du balkanmilitoj kaj la sekvaj du mondmilitoj. Fine de 1944 komenciĝis la nova periodo. Bulgario fariĝis en 1946 respubliko kaj nun apartenas al la socialismaj landoj historie forte ligita kun la Sovetunio. Kun la FR Germanio ne estas problemoj. Germanaj turistoj estas ĉiam bonvenaj en la gastama lando.

En Majo la fervojistaj esperantistoj el multaj landoj havos la unikan ŝancon

renkontiĝi grandnombre. Tro ofte la IFEF-kongresoj devis okazi kun nur malmulte da reprezentantoj el socialismaj landoj. Tiu jaro 1984 sendube instigos multajn gesamideanojn vojaĝi al Bulgario, al la Suna Bordo. GEFA apelacias al siaj membroj kaj iliaj familianoj partopreni multnombre la 36an IFEF-Kongreson, kiu cetere ofertas abundan turistan kaj folkloran programon. Sukcespromesa kongressemajno atendas vin. Do baldaŭ aliĝu kaj ĝis revido en Slânĉev Brjag.

W. B.

36. IFEF-Kongresß Bulgarien Gruppenflug – Liegewagen

Ergänzend zu den Mitteilungen in Bulteno 5/83 geben wir bekannt:

A Flug

Die als „voraussichtlich“ angegebenen **Zuschläge** zu den ab München geltenden Flugpreisen sind noch geringfügig geändert worden. Sie betragen nunmehr endgültig bei Abflug von Frankfurt 40 DM, von Düsseldorf 50, von Hannover oder Hamburg 60 DM.

Flugzeiten: Die voraussichtlichen Flugzeiten (jeweils donnerstags) sind:

München	ab 16.40	Burgas an 19.55
Frankfurt	ab 10.15	Burgas an 13.35
Düsseldorf	ab 18.05	Burgas an 21.45
Hannover	ab 17.45	Burgas an 21.30
Hamburg	ab 9.45	Burgas an 13.35

Rückflüge:

Burgas	ab 14.00	München an 15.15
Burgas	ab 8.00	Frankfurt an 9.20
Burgas	ab 15.30	Düsseldorf an 17.10
Burgas	ab 15.05	Hannover an 16.50
Burgas	ab 7.00	Hamburg an 8.50

Die endgültigen Flugzeiten werden mit Zusendung der Reisepapiere bekanntgegeben.

Verkehrsverbindungen und Entfernungen vom Hbf zu den Flughäfen

München 10 km,
Flughafenbus, Fahrtdauer 15 Minuten
Frankfurt 18 km
S-Bahn Nr.14 od.15, Fahrtdauer 12 Minuten
Düsseldorf 8 km
S-Bahn S 7, Fahrtdauer 12 Minuten
Hannover 12 km
Flughafenbus Fahrtdauer 25 Minuten
Hamburg 12 km
Flughafenbus ab ZOB, Fluggast-Pavillon
(Nähe Hbf) Fahrtdauer 30 Minuten
Es wird empfohlen, spätestens 1 Stunde vor der Startzeit am Flughafen einzutreffen.

Talons Infolge eines Mißverständnisses werden nicht Talons im Werte von 11.50, sondern von 10.50 Lewa ausgegeben. Das geschieht im Hotel. Im Falle einer Erhöhung der Gaststättenpreise werden die Talons im Wert automatisch im gleichen Umfange angepaßt.

Zimmerbestellung Bei Buchung von Zweibettzimmern bitte angeben, mit wem zusammen oder schreiben „wird dem Hotel überlassen“.

Körperbehinderte, die Wert auf Unterbringung im Erdgeschoß legen, geben dies bitte bei der Buchung an.

Vegetarier können in den Gaststätten aus der Karte wählen.

Verlängerung des Aufenthalts bei der örtl. Reiseleitung möglich.

Visum Deutsche Staatsangehörige erhalten auf dem Flughafen Burgas kostenlos den Visumvermerk im Paß, der auch wieder zur Ausreise berechtigt.

B. Liegewagen

Die unter A aufgeführten Mitteilungen über Talons, Körperbehinderte, Vegetarier und Verlängerungen gelten für die Benutzer des Liegewagens gleichfalls.

Visum Deutsche Staatsangehörige erhalten das Visum kostenlos an der bulg. Grenze im Zug. Es berechtigt zur Ausreise sowohl in der Gruppe als auch einzeln. Bestimmungen für Ausländer siehe „Internacia Fervojisto“.

C. Allgemeines

Geldwechsel ist in den staatlich zugelassenen Hotels, Wechselstuben und Banken möglich, also nicht an der Grenze oder auf

dem Flughafen vorgeschrieben (auf den amtlichen Kurs werden augenblicklich 80% Aufschlag gezahlt).

Rückreise Der Transfer vom Hotel zum Flughafen bzw. Bahnhof Burgas wird für die Teilnehmer von Gruppenreisen durch die örtl. Reiseleitung geregelt. Einzeln oder in nur sehr kleinen Gruppen Zurückreisende melden diese Absicht bald nach Ankunft bei der Hotel-Rezeption. Die örtl. Reiseleitung organisiert dann **nach Möglichkeit** einen Transfer.

Teilnehmer am Ausflug nach Istanbul Sa 19. bis Di 22. 5.) können am 22. 5. den Nachtzug nach Sofia erreichen, Burgas ab 22.44 Uhr, Sofia an 6. 05., weiter mit Istanbul-Expreß, München an 24. 5. um 12.18 Uhr. Sie können damit die bis 23. 5. für die bulgarischen Strecken gültige Freifahrt ausnutzen.

Bitte beachten Sie unbedingt auch die in Bufteno 5/83 erschienenen Informationen!

Nekrologoj

La 10an de Decembro 1983 la sekcio Saarbrücken perdis sian longjaron membron, sinjoron

Ernst Schilz

el Klarenthal, esperantisto jam antaŭ la dua mondmilito. Ernst Schilz, malgraŭ multjara grava malsano, restis fidela membro de GEFA kaj de Sarlanda Esperanto-Ligo. Li apartenis ankaŭ, kun August Omlor, Jakob Schenkel kaj kelkaj aliaj, al la refondintoj de la sarlanda Esperanto-Movado en la postmilita tempo. S-ro Günther Becker reprezentis la esperantistaron ĉe la tombo de la mortinto, kiu pluvivos en la memoro de ĉiuj, kiuj konis la simpatian forpasinton.

Lastmomente ni ricevis la informon, ke nia samideanino, d-rino

Luise Schramm (70)

mortis en Stuttgart la 3 - 11 - 1983. En la sekvonta Bulteno ni raportos pli dentale.

Berichte der Gruppen



Elfriede Kruse 70 jarojn

La 13an de Marto 1984 Elfriede Kruse fariĝas 70 jarojn. Ŝi, kiu de 1956 dum 20 jaroj estis sekretariino de GEFA kaj krome dum 12 jaroj havis saman oficon en IFEF, multflanke influis la vivon de tiuj du organizoj. Flanke de GEFA ni aparte direktas niajn plej sincerajn, korajn gratulojn al la alte estimata, „Ronda naskiĝtag-infano“, kiu neniam ĝis nun ripozis en siaj multflankaj okupoj por GEFA. Sian ĉiaman helpopreton ŝi momente praktikas en „Bona Espero“ en Brazilio, kie ŝi ankaŭ pasigos sian naskiĝtagon. Ni ne dubas, ke la geinfanoj de Bona Espero tiun tagon faros vera festo por ŝi.

Ni deziras al ŝi por ankoraŭ multaj jaroj daŭran sanon kaj bonfarton, por ke ŝi povu ĝui la „senlaborajn“ jarojn de emeritino kaj krome siajn multajn inklinojn por arto kaj muziko, sed precipe por sia amata Esperanto.

En „Internacia Fervojisto“ vi povas legi omaĝon honore al Elfriede Kruse.

GEFA

Bremen

9. 11. 83 Über Eindrücke und Perspektiven einer dreiwöchigen Reise ins Reich der Mitte berichtete das Mitglied Grebe mit einem Dia-Vortrag über „China vor dem Jahr 2000“.

7. 12. 83 feierte die Gruppe Bremen in der Kantine des Bw Bremen 1 in zwangloser gemütlicher Runde das traditionelle Zamenhof-/Adventsfest.

18. 1. 84 Unter dem Thema „Probleme mit dem Kalender“ hielt unser Mitglied Dieter Hartig einen Vortrag über die Zeitrechnung bei den verschiedenen Völkern von der Antike bis in unsere Tage.

8. 2. 84 Jahreshauptversammlung um 20.00 Uhr im Hbf Bremen.

Coburg/Lichtenfels:

Zur Vorweihnachts-/Zamenhof-Feier versammelten sich 16 Mitglieder und Freunde in der Coburger Gaststätte Rustikana. Gruppenleiter Hans Müller begrüßte die Teilnehmer und skizzierte den Lebenslauf und die Bedeutung des Begründers der Internationalen Sprache. Mit einem Dia-Vortrag über Bulgarien und Informationen über den bevorstehenden IFEF-Kongreß in Slančev Brjag endete der offizielle Teil. Mit Liedern zur Weihnachtszeit in Esperanto und guter Bewirtung endete die harmonisch verlaufene Versammlung.

Frankfurt / Offenbach(M).:

Die Mitglieder der BSW-Esperanto-Gruppen Frankfurt und Offenbach und der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt folgten am 3. 11. 83 einer Einladung der Heinrich-Hoffmann-Gesellschaft ins Struwwelpeter-Museum zu einem Informationsabend und Struwwelpeter-Lesung in Esperanto mit Diaschau und Diskussion

Vor über 40 Teilnehmern erläuterte der Direktor des Museums, Herr Herzog, die vielen Exponate, so Struwwelpeter-Ausgaben in den großen europäischen Sprachen und – neben Esperanto – auch z. B. in japanisch, finnisch, ungarisch, türkisch, norwegisch, russisch, hebräisch und sogar in schweizerdeutsch.

Ein Sprecher der Gäste legte Inhalt und Ziele der internationalen Sprache

Esperanto dar. Die komplette Bildserie des Struwwelpeter mit Rezitation der Esperanto-Texte hob die Bedeutung dieser Übersetzung hervor.

Der Struwwelpeter in Esperanto

La Struvelpetro
Jen la malbelega homo;
Petro estas lia nomo.
Knab' en aĝo de ok jaroj,
Kun hirtegaj longaj haroj.
Ilin tondi li rifuzas,
Nek kombilon iam uzas.
La vizaĝon li ne lavas,
Li ungaĉojn longajn havas.
Ĉiu homo lin evitas
Kaj en domon ne invitas.

Köln / Wuppertal:

La 17-an de Decembro 1983 okazis en Wuppertal komuna Zamenhof-festo, al kiu invitis la Esperantogrupoj de Schwelm, Wuppertal kaj Düsseldorf kaj la GEFA-komisiito por la distrikto Köln. Sinjoro Conzeth de la Esperantogrupa Düsseldorf, kiu preparis la kunvenon, bonvenigis la 90 partoprenantojn, inter kiuj estis proksimume triono da fervojistoj kun familianoj. Heinz Schindler el Schwelm salutis en la nomo de la GEFA-komisiito Herlitze, kiu pro deĵoraj kaŭzoj ne povis partopreni, kaj transdonis al s-ro Conzeth la libron „La verda relo“. Post la kaftrinkado multaj vizitis la librostandon en la salono, kie s-ro Behrmann de la Esperanto-Centro Paderborn anocis centojn da Esperantolibroj. Krome oni povis vidi ekspozicion de Esperanto-poŝtmarkoj de s-ro Kronshage el Schwelm. Esperanto en radio estis la temo de la festprelego de s-ro Merckens el Wuppertal. Li ankaŭ aŭdigis partojn de Esperantogramoj el diversaj landoj. Poste gesinjoroj Schindler montris lumbildojn pri Ĉinio kaj raportis pri la vojaĝo kaj renkontiĝo kun ĉinaj Esperantistoj. El la tombolo, al kiu kontribuis ĉiuj partoprenantoj, kaj el unu aparta mondonaco oni enspezis 430 markojn. Por kovri diversajn kostojn oni bezonis 100 Gm, Bona Espero ricevis 300 Gm kaj la Esperanto-Centro 30 Gm. S-ro Conzeth dankis al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu sukcesplena festo. Post la vespermanĝo oni gaje babilis kaj festis la revidon en ĉi tiu jam tradicia regiona renkontiĝo.

Stuttgart:

In Stuttgart treffen sich montags zwischen 16.15 und 17.30 Uhr etwa 7 GEFA-Mitglieder:

„Wir lernen in Selbstlerngruppen“ (Methode Schiffer).

Mit den fortgeschrittenen Mitgliedern korrespondieren wir über ausgewählte Themen mit aller Welt (Adressen aus dem UEA-jarlibro). Eine kleine Weihnachtsfeier vereinigte alle zu einem festlichen Jahresabschluss. Mehrere Mitglieder beteiligten sich auch an der Zamenhof-Feier der GEA-Gruppe Stuttgart, die den Bavelo-Vorstand und den Präsidenten des DEB zu Gast hatte.

Beletrikisto fervoja en IFEF-Kongreso 1985

Duan fojon niaj literaturkreatoj estas vokataj partopreni konkurson pri fervoja kaj fervojista medioj. Ni memoras: okaze la 33-an Kongreson de IFEF 1981 en Regensburg LKK invitis al samtema konkurso, kiu trovis surprize multajn interesulojn kaj rezultigis la unuan beletran antologion pri la fervojo, titolitan „La verda relo“. Vere, la neatendita sukceso, la kreo de nia kolegaro, la konsiderinde alta nivelo de la verkoj senditaj, tio ĉio spronis nin, ĉerpi ankoraŭfoje el tiu bela mistera fonto.

Denove IFEF alvokas ĉiujn fervojistojn, amatorojn, amikojn de fervojo, kromprofesiajn beletristojn, kunlabori en la nova konkurso „Bonvojaĝu!“ laŭ simila regularo, aparte legebla en IF. Verku poezie kaj proze, fantazie kaj realisme el la tuta fervoja medio. Ĉu versoj pri gajaj scenoj, ĉi rimoj kiuj tamburas snufe kiel vagonareto tra nostalgiaj revoj, aŭ kiuj zumas sible kiel moderna rapidglita trajno fulmsimile tra neidentigebla pejzaĝo; ĉu poemo tragika, ĉu rakonto fabela, dramigita ĉiutagaĝo aŭ pripensiga evento: ĉiu verko, kiu respektas la teknikan regularon kaj agnositajn regulojn de poetiko, estas bona.

Pluajn informojn donas: Elfr. Kruse, Wiener Str. 121, 6000 Frankfurt/M 70. Nun kuraĝu! Bonvojaĝu!

wbr

Ankoraŭfoje ni mencias:

La broŝuron „La verda relo“, 56 paĝojn, vi povas mendi ĉe s-ino Elfriede Kruse se vi samtempe ĝiras 10,— GM al Sparda-Bank e. G. Frankfurt/Main, poŝtĉeka konto 569 08 Frankfurt/Main favore al E. Kruse, konto 129 957.

Hilfe für den Wald

Beim Esperanto-Centro in Paderborn ist die nebenstehend abgebildete selbstklebende Briefverschlusssmarke erschienen, die in Esperanto und Deutsch darlegt, daß Mensch und Erde ohne den Wald nicht existieren können. Die Marken sind schwarz auf grünem Grund gedruckt in der Größe 34×67 mm. Sie sind erhältlich in Bogen zu 6 Stück, Preis für einen Bogen 0,40 DM. Bei Einsendung von 2 DM zuzüglich 1 DM Versandkosten erhalten Sie 5 Bogen zugeschickt. Bei größeren Bestellungen bitte 1,50 DM für Versand rechnen. Bitte helfen Sie mit, dem Wald zu helfen!

Die Idee zu dieser Marke entwickelten Joachim und Irene Gießner; die grafische Gestaltung und den Druck besorgte Wolfgang Zietz, unser Mitglied, Druckerei Friedrichs in Herzberg am Harz.

Betrag bitte einsenden in Briefmarken an Esperanto-Centro, 4790 Paderborn, Postf. 1450, oder Überweisung auf dessen Postscheckkonto 259658-301 Hannover (Zweck angeben). GEFA

La tero bezonas arbarojn.
Kion haŭto signifas por
homo, estas arbaroj
por la tero.
Homo ne povas vivi
sen haŭto. Ne povas
vivi sen arbaroj la tero.
(Eldiraĵo de indigeno)

Die Erde braucht den Wald.
Was die Haut für den
Menschen, das ist der
Wald für die Erde.
Der Mensch kann ohne
Haut nicht leben. Die Erde
kann ohne Wald nicht leben.
(Worte eines Eingeborenen)



Esperanto-Centro e.V.
Grünigerstraße 5
D-4790 Paderborn

Unsere Druckerei in eigener Sache

Unsere Repro-Abteilung konnte inzwischen ausgebaut werden. Dadurch erhoffen wir uns eine weitere Qualitätssteigerung, vor allem in den Abbildungen. Die bisherigen Erfahrungen haben uns gezeigt, daß die exakteste Möglichkeit des Abdrucks von Diapositiven (schwarz/weiß oder farbig) erfolgen kann. Aus allen anderen Vorlagen Ihrer Beiträge, die Sie freundlicherweise der Redaktion übersandten, werden wir uns Mühe geben, das Bestmögliche herauszuholen. Im Druckverfahren erfolgt nun auch eine Umstellung vom Buchdruck zum Offsetdruck. Dieses könnte den Gesamteindruck auch nur noch verbessern.

Esperanto-Kurswochenenden in Herzberg am Harz:

Die erste Teilnahme ist kostenlos. Ab 2. Teilnahme nur 10,- DM Unkostenbeitrag. Die Kurse beginnen jeweils freitags, um 19.00 Uhr und enden sonntags, um 12.00 Uhr. Es finden Kurse in 3 Stufen von Anfängern bis Sprecher statt.

Nähere Auskünfte in Herzberg über die Telefonnummern 0 55 21 / 13 63 oder 68 41 der Esperanto-Gesellschaft-Südharz, Grubenhagenstr. 8 in 3420 Herzberg/Harz.

Bitte merken Sie sich die Daten vor und melden Sie sich rechtzeitig an:

09. — 11. 03. 1984 11. — 13. 05. 1984
07. — 09. 09. 1984 09. — 11. 11. 1984

Essen:

Wir begrüßen Frau Alwine Leufke,
4404 Telgte 2, recht herzlich als neues
Mitglied und wünschen guten Erfolg beim
Studium des Fernkurs
„Esperanto programita“.

Ab 10. Januar 1984 findet jeden Dienstag
(19.00 bis 21.00 Uhr) im Sozialgebäude
(Kantine) des Bahnhofs Hbf Augsburg
Esperanto-Unterricht statt. Den Unterricht
hält der ehemalige Bezirksbeauftragte für
Esperanto und jetzige Landesvorsitzende
der Bayrischen Esperanto-Liga,
Hermann Schmid.

La LKK por la 70a Universala Kongreso
de Esperanto 1985 en Augsburg jam
eldonis unuan informon pri la kongresurbo,
kiu jam estis grandnombre disdonita dum
la UK en Budapeŝto. Ankaŭ jam pretiĝis
multkolora afiŝo pri Augsburg kun
esperantlingva surpriso. La urba prospekto
pretiĝos tre verŝajne komence de Marto.

Interesuloj sin turnu al la LKK, Seitzstr. 14,
8900 Augsburg. Estas preferinde, ke
mendojn oni faru grupe pro afrankaj
kaŭzoj.

Al la estraranoj kaj komisiitoj

La printempa renkontiĝo okazos sabaton,
la 24an de Marto en Würzburg. Ni kun-
venos en la konferenc-salono (urba flanko)
de la stacia restoracio. Daŭro 11.00 ĝis
16.00 horo. Apartaj invito kaj tagordo
sekvos. Evtl. dezirojn pro tranokto bv.
direkti al Bba Röder.

Ĉeĥoslovakio:

Pluaj linioj elektrizotaj

Laŭ la sepa Kvinjaro-plano de Ĉeĥoslovakio
pluaj investoj por la elektrizado de la
Ĉeĥoslovakaj Statfervojoj (ĈSD) estas
projektitaj. La nuna reto de ĈSD, kiu
amplersas 13 000 km, jam estas elektrizita
je 23 %. Dum la venontaj jaroj aldoniĝu
pluaj 515 km, krome 250 elektraĵaj lokomo-
tivoj estu havigotaj.

tradukis: M. Retzlaff

— ✱ —

Je l' nova jaro

Samkiel sekrete,
mallaŭte, paŝete
surtretas la teron
anĝel' de l' Sinjor',
alvenis la tago.
Ho, bonan matenon!
Ho, sanktan bonvenon!
Alportu ĝi benon!
Jubilu la kor'!

En Li la komenco!
Per Lia potenco
moviĝas la tuta
stelar' super ni!
Vi, patro, Vi gvidu!
Ja estas nenio
sen Vi, kara Dio!
Al Vi estu ĉio
lasita de mi!

Eduard Möricke, 1804 — 1875,
tradukita el la germana de M. Retzlaff

— pr — Redaktfino por n-ro 2/84 estas la 1.4.1984

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo
Stato: Januaro 1984**

Estraro

Prezidanto: BAR a. D. Giessner,
An der Nicolai-Schule 3, 3420 Herzberg
am Harz, tel. 0 55 21 / 45 86; EDS an
Bf 342 Herzberg (Harz)

Vicprezidanto/Redaktoro:

BAR a. D. Grass, Sachsenstraße 7,
8620 Lichtenfels, tel. 0 95 71 / 64 68
EDS: Gepa 862 Lichtenfels, Fach 3

Sekretario: BAmtm a. D. Schropp,
Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.)
tel. 02 51 / 31 58 47,
EDS: DB-Schule 440 Münster (W.)

Distriktaĵ komisiitoj:

Essen: TBOS Retzlaff, Bf 474 Oelde,
BSW-Fach, tel. 0 25 22 / 36 52

Frankfurt/Main: BAR Kiefer, BSA 600
Frankfurt/Main, AA 341, Basa 955/5656

Hamburg: BHS Böhnke, Bf 240 Lübeck Hbf.
Basa 947/866/374

Hannover: BBI a. D. Heimlich,
Bf 304 Soltau/H., tel. 0 51 91 / 52 13

Karlsruhe: BOS Bernhard, Bf 680 Mann-
heim Hbf, Basa 953/899/1232 aŭ 1238

Köln: BAmtm Herlitze, BD 500 Köln,
Büro B (Ozl); Basa 943/3473

München: Adolf Hrazdil
Bf 890 Augsburg Hbf
Privat: Herrenbachstr. 58, 8900 Augsburg

Nürnberg: TBAR Röder, BD 850 Nürnberg
Th 20, Basa 966 / 5671

Saarbrücken: BBI a. D. Haupenthal,
BD 660 Saarbrücken, V 26
Privat: Brennender-Berg-Str. 28
6603 Sulzbach/Saar, tel. 0 68 97 / 38 56

Stuttgart: TBOAR Krüger,
BD 700 Stuttgart, Bmkr. 3; Basa 952/3125

Specialaj komisiitoj

Administrado de la BSW-financrimedoj:
BHS-in a. D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121
6000 Frankfurt/Main 70, telef. 06 11/65 73 65

Arkivo: BHS Barmaneter, Bf 894 Memmin-
gen; Basa 962/809/357

Biblioteko: BAmtm Rösemann, BD 300
Hannover, Bf 52; Basa 949/1470

Gazet-kolektejo kaj -forluado: BAR Kiefer,
BSA 600 Frankfurt/Main, AA 341,
Basa 955/5656

Bulteno-dissendo: BOS a. D. Schindler
Max-Klein-Straße 21, 5830 Schwelm,
tel. 0 23 36/1 56 54, EDS: Fka 583 Schwelm

Fakterminaro: LBI Hartig, Bw 280 Bremen 1;
Basa 949/832/365

BOAR Ritterspach, ZVL 650 Mainz,
AA 8102, Basa 954/5533;

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:
BAR Lautenbach Bkr 5, Bf 640 Fulda;
Basa: (nur lunde) 955/1639
Privata adreso: Abtstor 21, 6400 Fulda,
tel. (06 61) 7 76 27;

Kasisto: BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim
Hbf, Basa 953/899/1232 aŭ 1238

Specialaj taskoj: TBAR a. D. Brandenburg,
Brinker Damm 24, 4404 Telgte 2 - West-
bevern, tel. 0 25 04 / 83 60
EDS (ne urĝajn): DB-Schule, 440 Münster

BOAR Barnickel, ZVL 650 Mainz, AA 8402,
Basa 954/5537

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Jen ni komunikas la aktualan adresaron
de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj.
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii
la akuratan akcepton.